



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 8/1974 - 22 feb 1974

Aperas ĉiusemajne

Jara abonkotizo

30,- DM

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

Urbestraj salutvortoj

Kronach (pp) Sub la protektado de la urbestro de Kronach, Baptist Hempfling, okazos de la 4 - 10 aŭgusto 1974 la oficiala postkongreso de Esperanto 1974 en la "perlo de la Frankonia Arbaro". La urbestro dediĉis al la partoprenontoj jenajn salutvortojn:

"Korege mi salutas kaj bonvenigas ĉiujn partoprenantojn en la postkongreso de Esperanto 1974 en Kronach, la malnova frankonia urbo en la nordo de Bavarujo. Kune kun la konstanta plifirmiĝantaj internaciaj rilatoj ankaŭ la Esperanto-movado akiras kreskantan signifon kaj konsiderinde kontribuas al la reciproka interkompreniĝado de homoj en la tuta mondo.

Al la Germana Esperanto-Asocio - kaj same al ĝia aktiva grupo en Kronach - mi deziras multan sukceson en la klopodado pri pli bona interpopola kompreniĝado, kaj al la gastoj, kiuj okaze de ĉi tiu kongreso vizitos la Cranach-Urbon, mi deziras tre agrablajn restadon. Mi ĝojus, se ili, memorinte pri amuze pasigitaj horoj, vizitus nin iam denove kune kun amikoj.

Baptist Hempfling

Urbestro de Kronach "

Bonaj perspektivoj en Tiĉino

Lugano (pp) Interesa evoluo montriĝis pasintjare en Tiĉino, Svislando. Dum aprilo publika prelego de prof. d-ro Dazzini pri "Esperanto en la lernejoj" kaj tute aparte rilate al la itala legpropono okazis en Lugano. Sekve de tiu prelego okazis kontaktoj kun kelkaj tiĉinaj parlamentanoj. Komence de decembro tiuj kontaktoj post kelkmonata flegado kondukis al oficiala transdono de letero al la eduk-direktoro. Tiu letero enhavis proponon subskribitan de 5 kantonaj parlamentanoj el diversaj partioj.

Paralele al tiu agado, sed tute memstare kaj sendepende okazis publikigo de valoraj artikoloj koncerne la instruadon de Esperanto en la lernejoj en la itallingva informilo de Tiĉina Esperanto-Ligo. Ankaŭ la novembra kultura semajnfino bonege subtenis kaj akcelis tiujn strebadojn. Ne laste la publikaj amasinformiloj, televid- kaj radio-raportoj, longaj artikoloj publikigitaj en kultura revuo kaj Migros-gazeto, disvastigis la informojn pri sukcesoj kaj la hodiaŭa situacio de Esperanto.

Per tio ĉio oni ankaŭ atingis la atenton de la edukdepartemento, kiu petis pri daŭra alsendo de TEL-publikaĵoj. Tiu departemento eĉ informis nin pri la nomo de ĝia respondeculo pri enkonduko, respektive instruado de moderna lingvoj. Per tio ŝajnas atingita bona pozicio por pluj estontaj agadoj.

Svisaj Esperanto-tagoj en Zŭrich organizitaj de Svisa Esperanto-Societo okazos de la 16 - 17 de marto 1974. Informojn donas Otto Walder Esperantoweg CH-8590 Romanshorn.

Esperanto - Somero 1974 - partoprenu la multajn internaciajn Esperanto-aranĝojn en FRG. Informojn donas Pilo-Press!

D-ro V. Sadler korektas

Pilo-Press ricevis leteron de d-ro V. Sadler, direktoro de la Centra Oficejo de UEA, responde al nia informo en n-ro 4/74, ke li volas ekŝiĝi el sia funkcio. Ni volonte publikigas la koncernan parton de la letero, en kiu d-ro Sadler konstatas, ke tiu informo ne plu estas aktuala. D-ro Sadler skribas: "Mi skribas por atentigi pri eraro en 'Pilo-Press' n-ro 4/1974, de la 25a de januaro 1974. Surbaze de informo de prof. Popović en "La Suda Stelo" vi publikigis, ke mi volas ekŝiĝi el mia funkcio. La raporto de prof. Popović estis tiurilate korekta en la momento, kiam ĝi estis verkita, sed pro la tre malfrua apero de "La Suda Stelo" la informo estis jam malaktuala, kiam ĝi atingis vin. Estus kompreneble pli bone, se vi povus kontroli la ĝustecon de la informoj ĉe mi aŭ ĉe la Estraro de UEA, antaŭ ol publikigi ion pri la Asocio."

Lingvocibernetika Laborrondo

Paderborn (hb) En la Integra Altlernejo (poste Universitato) de Paderborn funkcias ekde la 7a de februaro la lingvocibernetika laborrondo, kiun partoprenas 7 docentoj sub la gvido de prof. d-ro Helmar Frank, la verkinto de la famaj "tezoj por la germana lingvo-politiko". Unu el la partoprenantaj docentoj estas d-ro Hans Kasselmann, la estro de la Laborrondo pri Esperanto kaj Interlingvistiko ĉe la Altlernejo. Ĉefaj temoj de la unuaj kunvenoj estas komputeraĵ lingvoj kaj problemoj de aŭtomata lingvotraduko.

Informado

Paderborn (hb) La 13an de februaro okazis fakkunveno de Fachverband Moderne Fremdsprachen (faka unuigo pri Modernaj fremdlingvoj) kun 600 partoprenantoj. D-ro Kasselmann disdonis informilojn pri Esperanto kaj havis la okazon multe diskuti. Inter la partoprenantoj estis ankaŭ 2 Esperanto-parolantaj instruistoj.

Ministra permeso

Paris (lgr) Responde al skriba demando de parlamentano (en "Journal Officiel"), la ministro pri edukado rajtigis la instruadon de Esperanto en duagradaĵ lernejoj, kadre de soci-edukaj aktivaĵoj (libervolaj). Sed, en la sama letero la ministro neas la kulturalan fundamenton de Esperanto... Aliflanke, la instruista revuo L' EDUCATION aperigis favorajn reagojn de legantoj pri la lingvo internacia.

Bona rezulto

Limburg (pp) Pli ol 120 lernolibroj "Wir lernen Esperanto" estis venditaj al interresuloj responde al demando de legantino en la plej granda junulara revuo "BRAVO". (Vidu Pilo-Press 3/1974!)

Esperanto en francaj lernejoj kaj kolegioj

Perpignan (pp) En la kadro de la horaro por kulturaj aktivecoj en lernejoj kaj kolegioj prelegoj kaj provlecionoj de Esperanto komenciĝis en la departemento Pyrénées Orientales. Prelegis kaj gvidis la kursojn René Llech-Walter el Perpignan. S-ro Deligne, delegito de UEA en Narbonne (Aude) ĉeestis kaj partoprenis ĉar li deziras fari same en la departemento Aude.

Ĉe la fino de la prelego kaj kurso 138 gelnantoj donis nomojn kaj adresojn por ricevi dokumentojn kaj 25 enskribiĝis por eventuale sekvi kurson. 300 gelnantoj partoprenis la prelegon kaj kurson.

G. Marin vizitas sian hejmon - la mondon

Ĉu vi scias, kiu estis Gaspard Marin? Mi devas konfesi, ke ankaŭ mi ne scias ĝis hodiaŭ, kiam alvenis nova libreto el Jugoslavio en la serio de IKS, Nu, G. Marin estis esperantisto, pioniro el la jaro 1899, li multe vojaĝis tra la mondo per nekutimaj vojoj, li studis la homojn kaj kutimojn de la vizititaj landoj kaj regionoj kaj faris multajn notojn kaj skribis leterojn. Liaj manuskriptoj estis kolektitaj, kiam li mortis en la jaro 1969. El tiuj materialoj kaj taglibraj notoj ek-estis la libreto belaspekta kun la titolo "G. Marin vizitas sian hejmon - la mondon". Por esperantistoj tia titolo ne estas surpriziga - nia hejmo vere estas la mondo! La leganto certe trovos ion interesan, speciale el la etnografia sfero. Prolegon skribis Marinko Ĝivoje.

Bibliografiaj notoj: Formato 11,6 x 16,5 cm, broŝ., 80 paĝoj, kun ilustraĵoj, prezo 3,-- GM

Esperanto en germana gazetaro

Hamburg (pp) "Die Welt", unu el la gravaj germanaj gazetoj, publikigis en sia eldono de la 12.2.74 ampleksan artikolon pri la venonta UK en Hamburg sub la titolo "Menschen aus 60 Nationen und eine gemeinsame Sprache" (Homoj el 60 nacioj kaj unu komuna lingvo). Aŭtoro estas Joachim Kranz.

Bunta mozaiko

Walter Sonderegger, esperantisto el Zürich, Svislando, startis la 18 feb 1974 por feria vojaĝo al Sudameriko, la lasta terparto, kiun li ĝis nun ne vizitis. Lia vojaĝo daŭros ĝis la 31 marto, li trapasos 35 877 km per aviadilo, fervojo kaj buso, ĉiutage ĉ. 854 km. En Madrid, Caracas, Bogota, Lima, Buenos Aires, Montevideo, Sao Paolo, Rio de Janeiro, Belo Horizonte, Brasilia, Manaus, Salvador, Lisbono li havos kontakton kun esperantistoj. Walter Sonderegger konfesis al Pilo-Press: "Mi ĝuos denove Esperanton, verdire ĝi estas la internacia lingvo, la vere gefrata lingvo. Tion mi povas pruvi post vizito de ĉiuj partoj de la tero."

Esperantistoj el Pfaffenhofen, Bavario, vizitis antaŭ nelonge Hungarion kaj kontaktis diversajn esperantistojn, i.a. ankaŭ la ĉefon de hungara punejo, kapitano Josefo. Por la venonta vizito de esperantistoj el Bavario la esperantista kapitano faris allogan proponon: Se la privataj loĝejoj ne sufiĉos por gastigi la esperantistojn, li ordonos pendigi kelkajn malliberulojn. La liberaj ĉeloj tiam estos je la dis-pono de la esperantistaj gastoj. Pri la vero de la eldiro Pilo-Press ne garantios, sed tion skribis la loka gazeto de Pfaffenhofen kun la nomo "Ilmgau-Kurier".

VINO el

MANNHEIM

Opfer der Bundesgartenschau

einzigstes
Weinanbaugebiet
in der
Industrie-Metropole
Lage Sandgerwann



Erzeugerabfüllung
Esperanto-Ranch
Erhard W. Matthes
Mannheim 1
10. Sandgerwann

La Esperanto-ranĉo kaj vinberejo de Mannheim fariĝas viktimo de la hortikultura ekspozicio. Vidu la apudajn informon. Posedanto estas la konata esperantisto el Mannheim Erhard W. Matthes, D-68 Mannheim 1, Sandgerwann 10, Esperanto-Ranch. Pliaj "ranĉaj" novaĵoj sekvos en la venonta numero.

Unua Konkurso de la Pola Radio en 1974

- 10-taga ekskurso tra Pollando
- multaj premioj kaj memordonacoj

en enketo de la Pola Radio, anoncita por la eksterlandaj aŭskultantoj.

Al partopreno en la lotado de la premioj rajtigas respondo almenaŭ al unu el la jenaj demandoj:

1. Kiujn internaciajn iniciatojn de Pollando vi opinias speciale gravaj kaj kial?
2. Kiuj problemoj estantaj objekto de la debatoj de la Konferenco pri la eŭropaj sekureco kaj kunlaboro plej multe interesas vin?
3. Kiuj elsendoj de la Pola Radio en la periodo januaro — februaro 1974, laŭ via opinio, plej interese prezentis la bildon de la nuntempa Pollando?

La respondojn ni petas sendi al la adreso: Pola Radio, PL-00-950 Warszawa, P.O. Box 46, Pollando — en kovertoj signitaj per la devizo: „Konkurso“, ĝis la 15a de marto 1974 (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en niaj disaŭdigoj la 16an de aprilo 1974. La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Partoprenu mem kaj partoprenigu aliajn. Ni deziras al vi bonŝancon!

Pola Radio

La gastmikrofono de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio atendas la 17-an laŭreaton!

Aŭskultado al la Esperanto-elsendoj plifaciligas la respondadon al la supraj demandoj.

Radio Varsovio ĉiutage disaŭdigas en la internacia lingvo du programojn:

6,00 h - ondolongoj 41 m, 49 m, 200 m

16,30 h - ondolongoj 31 m, 41 m